

RADIO HAVANO KUBO EN ESPERANTO 25-jara voĉo kiu trairas la mondon

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

La Esperanto-redakcio fariĝis 25-jara! Ĝi naskiĝis la 11-an de septembro 1988 kun la celo disvastigi informojn pri Kubo rilate al ĉiuj temoj de la vivo. La radiostacio estas publika servo kiu ekde la 1-a de majo 1961 elsendas en naŭ lingvoj per mallongaj ondoj. Dum la lastaj jaroj, kun la novaj teknologioj, Radio Havano kreis propran retejon kaj ankaŭ en Esperanto ĝi funkcias ekde la jaro 2004.

La skipo de la E-redakcio estas plejparte volontula kiu utiligas Esperanton samkiel kiel la ceteraj lingvoj, nome: hispana, angla, franca, portugala, araba, keĉua, gvarania kaj kreola.

Radio Havano en Esperanto posedas riĉan kolekton de sonmaterialoj kolektitaj dum kongresoj landaj kaj internaciaj, intervjuoj, muziko k.a. kiuj estas parto de la historio de KEA, daŭra kaj esenca subtenanto por nia laboro.

La E-redakcio estas evidenta pruvo pri tio kion povas transdoni Esperanto se oni uzas ĝin por praktikaj celoj. Ĝi estas fakto kiu havis kaj plu havas la kontribuon de diversaj homoj kies volontula agado helpis al ĝia ekzisto. Eblas mencii plurajn kiuj nun forestas, sed restas amike trans la etero aŭ aŭskulte per la interreto: Orlando Raola, Elsa Torres kaj Alexis Otero; aldonendas Norberto Díaz Guevara, Yoandra Rodríguez,

Alejandro García, Mario Ruiz Karell kaj Ariadna García. El aliaj landoj ĉiam kontribuis Ottrino Carotta, Leopold Patek, Arnold Viktor kaj aliaj el Eŭropo kaj Brazilo, kie ni havas multajn geaŭskultantojn.

Dum 25 jaroj, vizitis nin esperantistoj kubaj kaj alilandaj, daŭre kontribuis radioamantoj kaj geaŭskultantoj el la tuta mondo, kiuj esprimis sian dankon pro la ekzisto kaj kontribuo de la E-redakcio ne nur informante ilin pri Kubo, sed ankaŭ pri la amerika kaj kuba movadoj.

Muziko kaj utiligo de la sonmaterialoj por klubaj prezentoj kaj eĉ lecionoj, aparte en la amerika regiono, estis alia ŝatata servo. La E-disaŭdigoj okazas nur en dimanĉoj al diversaj mondopartoj.

(Vd. tabelon). La plej vasta kolekto de

E-programoj troveblas en la retejo de la Amerika Komisiono de UEA ĉe www.ameriko.org.

Ni invitas vin ankaŭ viziti nian retejon, kie eblas aŭdi kaj elŝuti la elsendojn. Danke al subteno de KEA kaj al la fidela kontribuo de pluraj esperantistoj kiuj regule aŭdas kaj raportas la elsendojn, la E-redakcio de Radio Havano povas en la praktiko montri la utilecon de la lingvo.

Ni atendas vian subtenon por estontaj projektoj kiuj celas plu daŭrigi kaj savi valoran servon kaj ties historian kaj kulturalan trezoron.



Kara leganto!

Eĉ se pli malfrue ol anoncite, jen la tria numero de nia bulteno.

Tre verŝajne la reago al la du unuaj estis tiel pozitivaj, ke ĉi-foje ni ricevis pli da kontribuadoj ol ni iam pensis kaj tiu ĝojiga fakto devigis nin aldoni paĝojn.

Tamen, ne ĉiuj agadoj entreprenitaj en niaj filioj kaj grupoj, trovis sian vojon al ni. Jen venas raporto sen fotoj, foje la sola foto estas ne tute uzebla... Ni ne rajtas forgesi la valoron dokumenti niajn aranĝojn kaj tiel samtempe stimuli la kunlaborintojn, kiuj vidas raporton pri la farita laboro.

Informado estas grava agado kiun ni devas lerni pli bone ekspluati. Kaj iuj el ni devas nepre prizorgi tiun taskon. Al aranĝoj ni iru ne nur pliriĉigi la programon aŭ pasive partopreni ĝin, male, ni fotu, ni verku raporton pri ĝi kaj tuj-tuj, se oni ne povas mem enretigi tiun informon, tiam oni nepre sendu ĝin al kolego kaj estus ja tre oportune se kopion ricevus nia Centra Oficejo. Tie ni kompilas la materialon kaj ankaŭ klopodas disvastigi la novaĵojn per plej diversaj kanaloj. Ni atendas viajn kontribuadojn. Ek do!

Amike,

Alberto F. CALIENES
Prezidanto de KEA

ESPERANTO-ELSENDOJ DIMANĈAJ

Regiono	kHz	m	UTC
Norda, Suda kaj Centra Ameriko	11760	25	15:00-15:30
Norda Ameriko	6010	49	07:00-07:30
Suda Ameriko	15370	19	22:30-23:00

Radio Havano en Interreto:

<http://www.radiohc.cu/eo/audios>

Retejo:

radiohc@enet.cu.

En 1989, okaze de la 1-a Datreveno de la E-elsendoj de RHK. Kunfestas aktivuloj kaj estraranoj de KEA. Kvara kaj kvina de dekstre, Maritza Gutiérrez kaj Orlando Raola fondintoj de la E-redakcio. Foto: Arkivo KEA.



KIU ESTAS KIU INTER NI

Eroj de nia historio

Jen nova rubriko de nia bulteno. Per ĝi oni celas iom post iom prezenti gravajn aspektojn de la kuba Esperanto-movado, de la komenco ĝis la nuntempo, kiuj ĉiam aperos izolitaj, sed kiel partoj de sendependaj serioj.

Sur tiu vojo mi planis proponi plurajn temojn, kiuj samtempe povus esti bazo de estontaj esploroj de nia esperantistaro. Inter ili, menciendas: Kubaj E-asocioj, Sidejoj, La E-instruado ĉe ni, Nia gazetaro, La Internacia Lingvo en radio kaj televido, Esperantistinoj, Gravaj esperantigitaj tekstoj, Kubanoj en UK-oj, Plenkunsidoj, Kongresoj, Festivaloj, Novaj centjariĝoj, ktp.

Tre speciala serio estos Kiu estas kiu inter ni?, ĉar temas pri pluraj personoj kiuj multege agadis favore al Esperanto nialande. Kadre de ĝi, aperos aliaj temoj, kiel Pioniroj, Propagandistoj,... kaj tiu, kiu malfermas la rubikon, Niaj honoraj membroj, kiu aperos en ses partoj kiel unika enhavo de Eroj... Poste, ĝi konsistos el partoj, la dua ĉiam dediĉita al Kiu estas kiu...?



Dum KEA-Komitakunsido en Bayamo, januaro 1998. Kune kun li, sidas du kromaj Honoraj Membroj de KEA: S-ino Rosa Castañeda (meze) kaj S-ino Socorro Castro (forpasinta); malantaŭ ili: Maritza Gutiérrez (KEA-Estrarano) kaj Rafael Cabrera (tiama prezidanto de la loka estraro, nuna Komisiito por la Orienta Regiono). Fotis: J. R. Rodríguez

NIAJ HONORAJ MEMBROJ (I) Pedro Pablo Lamas Díaz

Juan Ramón RODRÍGUEZ GÓMEZ

Pedro Pablo Lamas Díaz naskiĝis la 18an de oktobro 1929 en Ciego de Ávila. Li havis siajn unuajn kontaktojn kun Esperanto en 1948, sed vere esperantistiĝis 1962, kiam li estis instruistoj en Komerca Instituto. Tuj poste, li entreprenis la disvastigadon de la lingvo en la tuta lando kaj fondis la E-grupon Andrés María Oliva y Cuevas, la unuan en sia provinco, la 12an de oktobro 1964.

Li lerte eluzis la rimedojn de radio-elsendoj, revuoj, instruado, personaj intervenoj ĉe la Ministerio pri Edukado k.s., por disvastigi intereson kaj scion pri la lingvo tra la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj.

Kune kun Raúl Juárez Sedeño* (Camagüey, 02.10.26), li estas ĝenerale konsiderata patro de la hodiaŭa kuba Esperanto-movado kaj kunfondinto de Kuba Esperanto-Asocio (KEA, 16-06-79).

Dum 1971-74, li rolis kiel peranto de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Kubo, kunlaboris kun la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj flegis la disvastigantan movadon en sia provinco. Naci-

skale, li dissendis perkorespondan kurson, dank' al kiu lernis la lingvon dekoj da homoj, kiuj siavice fondis aliajn klubojn, kiel Havana Esperanto-Grupo (poste Havana Esperanto-Rondo). La 16an de majo 1974, li fariĝis Dumviva Membro de UEA.

Meze de la okdekaj jaroj, li finis la verkadon de *Curso autodidacta de Esperanto*, ankaŭ dissendita.

En 1987 (decembro, 6a-8a), partoprenis la Unuan Kongreson de Kuba Esperanto-Asocio, kiam oni nomis lin Honora Membro de KEA. Dum la 75a Universala Kongreso (Havano, 1990) li ankaŭ ricevis la kategorion de Honora Membro de UEA.

Tiaj meritplenaj kondiĉoj ne restis kiel rezulto de lia longdaŭra kaj sindediĉa laboro por Esperanto, ĉar poste li daŭrigis sian senĉesan laboron favore al la lingvo en la lando kaj samtempe kunlaboradis kun la Komisiono pri Historio de Esperanto en Kubo, per donaco de la plej granda parto de sia impona kolekto de E-libroj, gazetoj, kaj pli ol milo de alitipaj dokumentoj.

En lia provinco, ekterasociaj institucioj ankaŭ rekonas lian agadon por Esperanto kaj por aliaj aferoj rilataj al la lokaj kulturo, historio, arto, ktp. Rezulto el tio estas la fakto ke, dum la lastaj 15 jaroj, li ricevis plurajn ordonojn, inter kiuj, *Arnaldo Aguilar Couso* (Oficejo de la Urba Historiisto), *Ornofay* (Provinca Muzeo) kaj *La utilidad de la Virtud*, (Kultura Societo José Martí).

Kaj li plue laboras. Ankoraŭ li sendas dokumentojn, historiajn poŝtkartojn, interesajn E-materialojn por nia Komisiono. Do, 50 jaroj da laboro por Esperanto.

Nun, okaze de lia 84a naskiĝdatreveno, la 18an de oktobro 2013, la kuba E-movado profitas la momenton por kore gratuli al nia kara instruisto, senlaca kunlaboranto kaj amiko Pedro Pablo Lamas Díaz.

* Forpasinta en Camagüey majo de 2012.

Bibliografio

FETTES, MARK: "Pioniroj el tri kontinentoj" [Honoraj Membroj de UEA], en *Esperanto*, 83-a jaro, n-ro 1019 (11), novembro 1990, Rotterdam, p. 213.

RODRÍGUEZ GÓMEZ, JUAN RAMÓN: "Historia de un hombre sin historia" (hispanlingva biografio, okaze de lia 80 jaraĝo), Havano, oktobro 2009 (*ne eldonita*).

—: "Lamas: un hombre sin historia", Aneksa VII, en *El Esperanto en Cuba*; historia comentada, t. 1 (1904-1973), La Habana, 2013, (*ne eldonita*).

Lingvo kaj stilo: kelkaj ideoj kaj unu poemo

Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Esperanto kiel ĉiu vivanta lingvo ne povas resti senmova aŭ indiferenta al la homa progreso. Ĝi ankaŭ evoluas paralele al la vivo kaj tiel2 adaptiĝas al la novaj cirkonstancoj kaj postuloj. Tamen, paroli pri lingvo kaj stilo ne estas facila tasko, sed granda defio, despli kiam la temo ne estas tiel ofte priskribita kiel ja elvokita.

Kiel sciante, ĝi estas fenomeno lingva, sed ankaŭ socia kaj kultura nepre ligita al homa penso kaj kulturo en plej vasta senco. El tio evidentas ke Esperanto, samkiel aliaj lingvoj havas sian propran strukturon, vortfaraĵon, elparolon kaj entute normon evoluantan laŭ la praktiko kaj bezonoj transvivi la ĉiam ŝanĝiĝantan mondon.

Tio signifas ke ĝi havas sian propran stilon, kiu distingas ĝin disde aliaj naciaj lingvoj. Ĝi ne blinde imitas la stilojn de tiuj aliaj lingvoj, sed memstare evoluas laŭ propraj trajtoj.

Krom enkonduko de novaj vortoj por esprimi la homajn pensojn kaj enpenetri la diversajn sciencajn sferojn, arton, sporton, ktp, ĝi devas esprimi la lingvan kutimon kaj esprim-manierojn de la nuntempaj kulturitaj homoj, sed por plenumi tiun celon, ĝi ofte bezonas novajn parolturnojn, t.e. esprimojn ene de ĝia propra stilo.

Sed kio estas stilo? Laŭ PIV ĝi estas karakteriza persona maniero esprimi sian penson kaj due, tuto de la ecoj, kiuj karakterizas belartan verkon de iu artisto... Do, la E-an stilon formas la tuto de karakterizoj kiuj ebligas propran manieron esprimi la homan penson. Certe ne mankas eldiroj pri tio ke Esperanto estas lingva artverko de la genio de Zamenhof. La stilon ni povas trovi en la tuto de elementoj kaj iloj kiuj strukturigas la lingvon kadre de propra spirito kaj provizas ĝin per karakteriza maniero konstrui vortojn, propoziciojn kaj frazojn.

Tamen, ni devas emfazi ke ĝuste en tiu ĉi aspekto pri formado de novaj esprimoj oni

ne devas blinde sekvi la naciajn modelojn, kiuj ofte ne estas pli bonaj aŭ pli logikaj, sed ni devas utiligi antaŭ ĉio la internajn eblojn de la lingvo mem.

Unu el tiaj ebloj estas la senpera verbigo de adjektivo: ekz. **grava** → **gravas / gravigas**.

Tia uzo ne estas kontraŭfundamenta kaj kontribuas, sen troigoj, al beleco kaj klareco de la lingvo, krom variigi la stilon sekvante la internan inercion de Esperanto.

Grava paŝo en la alproprigo de la lingvo-spirito, kaj do, de la lingvo-stilo okazas kiam ni eksentas la esencon de ĉiu el la elementoj de Eo kaj akiras kutimon pensi en ĝi.

Kvazaŭ resume ni povus aldoni ke la esperanta stilo ne difineblas per konkreta formulo aŭ rigida strukturo aŭ formo. Ĝi estas parto de la lingva spirito kiun esperantisto devas konscie kaj per studado alproprigi al si.

Tamen, ĉar promeso estas ŝuldo, pri la temo ni povas teorie reveni estonte, sed nun ni eksentu ĝin en la formo de poemo kiun mi kuraĝis traduki, ĉar tradukarto estas unu el la formoj per kiuj mi klopodas kontribui al la interkultura rolo kiun la lingvo proponas.

Jen «Kantoj pri ampenoj» de la kuba verkistino Mirta Aguirre Carrera, unu el tiuj virinoj konsiderataj kiel steloj de la nacia kulturo.

Ŝi naskiĝis la 18-an de oktobro 1912. Ŝia poemverkaro transdonis ĉarmon al la poezio ĉefe por la infanaro. Ŝi scipovis ludi kun la lingvo kaj krei kortuŝajn aŭ simpatiajn poemojn. Inter ŝia vasta verkaro estas antologia libro por la infanoj *Juegos y otros poemas*.

Mirta Aguirre scipovis kombini sian politikan aktivadon kaj studadon. Diplomiĝinte pri juro, ŝi elstaris kiel prelegantino, eseisto, ĵurnalisto kaj politika aktivulino, ankaŭ kiel Direktorino pri Teatro kaj Danco en la Nacia Konsilio de Kulturo. Ekde 1962 ŝi estis profesorino pri artoj kaj beletro de la Havana Universitato kie ŝi estris la Fakon Lingvo kaj Hispan-



lingva Literaturo. Je la fino de sia vivo, en 1989, ŝi gvidis la Instituton de Literaturo kaj Lingvistiko de la Akademio de Sciencoj de Kubo.

Jen fragmentoj de la poemo «Kantoj pri ampenoj»:

N-ro 3

*Sen pravigo mi vin amas
Kaj nescia pri limdato
Aj! ami, amanta stato
Sen fidohava signalo.*

*Mia espero ja forpasis
Dum amo restas kiel bato
Kaj nescia pri limdato
Sen pravigo mi vin amas.*

N-ro 4

*Pri la iamo, kia dolor!
Ĉar povintus iĝi ver'
Vin aminte, kia plorve!
Vin forgesos mia kor'
Kaj plu venos mia konsol'
Ĉemane de la forges'*

*Ĉar povintus iĝi ver'
Pri la iamo, kia dolor!'*

Kion mi faras por Esperanto

Mi tiom multe amas Esperanton, ke mi fariĝis profesia esperantisto. En tiu ĉi momento mi estas oficisto de KEA. Krom miaj ĉiutagaj respondecoj mi ankaŭ aktivis alimaniere...

★ Mi ĉefe praktikas kaj uzas Esperanton. ★ Mi fervore aktivis ene de naciaj projektoj

kaj kunlaboras kun internaciaj organizaĵoj, kiujn mi ŝatas. ★ Mi hobbias pere de Esperanto, aŭ uzas Esperanton kaj la Jarlibron por pli bone scii pri iu ajn temo. ★ Mi partoprenas en kubaj E-renkontiĝoj, tio ankaŭ helpas mian aferon. ★ Lastatempe mi kun aliaj geesperantistoj stabiligis kaj organizis radioamatoran



Javier Ramos Nistal, Havano

klubon, kiu estis agnoskita de KEA, FRC (Kuba Federacio de Radioamatoroj) kaj la Ministerio pri Komunikado. ★ Nuntempe mi estas kasisto de la Junulara Sekcio de KEA. ★ Mi ankaŭ ŝatas disvastigi Esperanton, pro tio mi intruas regulan kurson en provinco Mayabeque kaj ekspre-san kurson en Pinar del Río.

ESPERANTO-KURSOJ: novaj fortoj kaj energioj

Julián HERNÁNDEZ ANGULO



Kursanoj en Havano. Lunde lernas progresantoj, marde du samtempaj kursoj por komencantoj; ĵaŭde kaj vendrede preparas sin kandidatoj por la Baza kaj Meza Ekzamenoj de KEA. Foto: Ismary Lezcano.

Septembro kaj februaro ĉiam estas bonvenaj monatoj por nia asocio pro tio ke ili alportas novajn fortojn kaj energiojn al la movado. Konsciante ke regulaj ĉeestaj kursoj estas la ĉefaj fontoj de esperantistoj en nia lando – la reto ankoraŭ estas revo por multaj kubanoj – ni klopodas kiel eble plej bone organizi kaj garantii bonan informan varbo-kampanjon. Ni ja scias ke por atingi la orelojn kaj okulojn de interesitoj kaj voki la interesecon de aliaj homgrupoj, ni devas disaŭdigi la alvokon al niaj kursoj pere de naciaj, provincaj kaj municipaj amaskomunikiloj kaj ankaŭ pere de grafika informado.

La ĉijaraj septembraj kursoj komenciĝis antaŭ tri semajnoj kaj la raporto ricevita de la provincoj kaj grupoj estas jena:

En Guantánamo Leonardo Luna kaj Tirso Ávila instruas al 18 lernantoj, Raúl Sánchez klopodas malfermi novan kurson. En la ĉefurbo de Santiago de Cuba, Gonzalo Collantes instruas rapidan bazan kurson al 11 lernantoj kaj superan kurson per la libro *Karlo* al 8 progresantoj. Temas pri la dua eksperimenta rapida kurso gvidata de Gonzalo: tuta baza kurso instruata dum dudek semajnoj konsistigas la eksperimenton. En municipo Contramaestre, Gra-

ciela Morgado instruas la duan nivelon al 8 lernantoj kaj Jaime Ginarte instruas la unuan nivelon al 12 lernantoj. En Granma Rafael Cabrera kaj Alexander Dumíán Martínez instruas la unuan kaj duan nivelon al 16 lernantoj en Bayamo, Río Cauto kaj Cauto Cristo plus unu en municipo Yara. En Holguín Magda Rodríguez Almaguer kaj Isnel Pupo Peña instruas la unuan nivelon al 22 lernantoj. En Villa Clara, Ángela Villavicencio instruas la unuan nivelon al 8 lernantoj; en la municipo Santo Domingo, José Luis Montes de Oca ankaŭ gvidas kurson. En Cienfuegos, Jorge Abreu Junco instruas la unuan kurson al 4 lernantoj kaj Enrique Pedroso instruas la duan al 8 lernantoj. En la municipo Jaruco, Mayabeque, Javier Ramos kaj Olyanlis Gutiérrez Rolo instruas la unuan nivelon al 21 lernantoj. Dum la someraj monatoj, Vilhelmo Luterano instruis al 13 lernantoj en municipo Calimete, Matanzas. En la speciala municipo Junulara Insulo, Tomás Rodríguez Lima instruas Esperanton al unu interesito.

En Havano estas 46 gelernantoj en la unua nivelo. Instruistoj Miguel Ángel González Alfonso, Fernando Paredes Elósegui, Sonia González Morales kaj Geomar Martínez Pérez instruas la unuan nivelon. Instruistoj Ismary Lezcano García kaj Niurka Alonso Santos gvidas kursojn de la dua nivelo kiujn partoprenas 6 gelernantoj. Instruistoj Pedro Fernández Rodríguez kaj Alberto Fernan-

dez-Calienes Barrios preparas 12 progresantojn por la baza kaj meza ekzamenoj de KEA respektive. Tiuj ĉi ekzamenoj ĉefe okazos dum KERo 2014.

Provincaj kaj municipaj filioj kaj grupoj ne forgesu kiom gravas tiuj agoj farataj en eksterlerneje kiuj igas la vivon de nia movado kaj komunikadon kun novaj interesitoj pli vigla kaj efika. Inter tiuj agoj estas la kulturaj kaj klerigaj aranĝoj en bibliotekoj, muzeoj, artgalerioj, ktp. kaj oftaj vizitoj al lernejo kaj klasoĉambroj kie estas la novaj lernantoj tiel ke ili kons-tatu ke Esperanto ne nur estas la instruisto kiu al ili instruas, sed asocio kaj movado kiu vivas ekster la muroj de la lernejo.

Nuntempe oni ne instruas en Las Tunas, Camagüey, Ciego de Ávila, Sancti Spiritus kaj Pinar del Río. Ni esperas, ke aktivuloj de tiuj provincoj kaj de aliaj helpu nin remalfermi pordojn de lernejoj kaj klasoĉambroj en tiuj provincoj. Ni ankaŭ profitu la eblecojn kiujn la ekspresa, reta kaj perkoresponda kursoj donas al ni por plenumi unu el la celoj de nia asocio – disvastigi Esperanton. Ni petas al ĉiuj estraranoj pri instruado en filioj kaj grupoj kaj al ĉiuj instruistoj daŭre sendi informojn pri ĉiaj kursoj, seminarioj, klerigaj renkontiĝoj, ktp.

Ni kaptas la okazon por esprimi nian fidon, estimon kaj laŭdon al tiuj kiuj estas ĉefaj motoroj de nia asocio dum la tuta jaro kaj al tiuj, kiuj ne instruas sed kontribuas diversmaniere al la sukceso de niaj kursoj en la tuta lando.

E-ekspozicio en Granma


“Dialogo en unu mondo kaj paco per Esperanto”

La 9an de septembro oni inaŭguris la bibliografian ekspozicion “Dialogo en unu mondo kaj paco per Esperanto”, en la Kulturdomo Raúl Gómez García de municipo Cauto Cristo en provinco Granma. Kunoordigis la tuton Alexander Dumíán kaj Rafael Cabrera, kiuj havas la subtenon de la historiisto de la municipo.

Lunde matene oni montris librojn, revuojn, gazetojn, broŝurojn kaj fotojn, tie estis ankaŭ malgranda murgazeto kun informoj pri Esperanto. Cabrera diskonigis la ekspozicion per la rubriko “Esperanto”, kiun li gvidas en Radio Bayamo kun la celo interesigi la loĝantaron, ĉefe en la norda parto de la provinco.

Li kunvokis ĉiujn en Kaŭto Kristo viziti la Kulturdomon por informiĝi pri Esperanto.

Alexander Dumíán MARTÍNEZ AGÜERO, Granma



Sukcesa Instruista Seminario en Santiago de Cuba

La Provinca Filio de KEA en Santiago de Kubo, okazigis la duan seminarion pri instruado de la 22a ĝis la 24a de aŭgusto ĉijare, kiun gvidis Gonzalo Collantes García.

La seminario celis instrui al novuloj elementajn konitaĵojn pri didaktiko, metodologio, kun enfazo pri la Komunikativa Metodo. La partoprenantoj montris grandan intereson pro la graveco de la seminaria enhavo; ili multe lernis kaj sukcesis la teorion ekzamenon, poste ĉiuj defendis kaj fundamentis metodologie ĉiun paŝon de la leciono dum 30 minutoj. Dum la lasta ero de la seminario, ili ĝuis videofilmon en Esperanto pri Haveno de la Kruco kaj Papago-parko el Tenerifo, ankaŭ ni ĝuis la ludon de Fratoj EL, kiuj interpretis repon.

La seminario, samkiel la adiaŭa tagmanĝo, disvolviĝis en esperantista, amika kaj solidara etoso. La freŝaj instruantoj tuj ekaplikos la teorion pri didaktiko, metodologio kaj la Komunikativa Metodon dum la lecionoj. Ili daŭrigos postbazan kurson kun la celo rapide plialtigi la lingvan nivelon.

La 29an de junio, la Provinca Filio festis la 34an Datrevenon de KEA, la Tagon de la Patrio, kolektivan naskiĝtagon kaj Kursfinan Aranĝon. Dek ses finlernintoj transprenis sian ateston pri sukcesa lernado.

Ni ĝuis E-muzikon luditan de la muzikensemblo Amindaj, duopo dancis kuban muzikon kaj esperantistino deklamis poemon. Je la fino de la festo, la filio proponis bufedon kaj trinkaĵojn.



Diplomitaj instruistoj en Santiago de Cuba. La dua plej granda Filio de KEA prizorgas mem la daŭran kvalifikiĝon de instruistoj. Foto: Gonzalo Collantes.

Septembre en la Provinca Filio komenciĝos nova instruperiodo kun dek novaj interesitoj, entute ĝis la 1-a de septembro nia Filio

havas 105 membrojn kaj la varbado ankoraŭ ne finiĝis.

Gonzalo COLLANTES GARCÍA,
Santiago de Cuba.



Subskribo de laborkontrakto inter la Kampadejo Jakabo, KoNoA la loka bazlernejo kaj E-Grupo Guantánamo. Foto: Tirso E. Ávila Bory.

Esperanto kaj Naturprotektado en Guantánamo

De la 19a ĝis la 22a de septembro okazis en la kampadejo Jakabo renkontiĝo por festi la 2-an Datrevenon de Kubaj Naturamantoj (KoNoA). Ni alvenis al la kampadejo kaj post enloĝiĝi ni vizitis la bazlernejon Blas Roca Calderío de Jakabo, municipo Imías, kie ni havis la unuan kontakton kun la lerne-

jestro. Post komuna fotado kun lernejoj kaj instruistoj ni revenis al la kampadejo por pretigi la kunvenon, kiu okazis en la ludejo. Tie, kune kun reprezentantoj de la Grupo pri Sanaktivuloj de nia provinco, ni ornamis ĝin, kaj lasis ĉion preta por la aranĝo.

La respondecoj de la kampadejo, la lernejo, kaj KoNoA

subskribis kunlaboran kontrakton por daŭre entrepreni tiun naturprotektan agadon kun lernejoj.

Je la fino, la infangrupo kune kun la ĉeestintoj plantis kvar arbojn por simboli la fondon de la klubo kaj oni donacis al la infanoj kraĵojn, afiŝojn, pentri-

lojn, saketojn, ludkartojn, ktp. Dum la fermo, oni klarigis ke la infanoj lernos Esperanton pere de sia faka laboro de naturprotektado. La evento estis treege sukcesa.

Tirso E. ÁVILA BORY
Guantánamo





Partoprenintoj en la unua elsendo de la Speciala Kolektiva Radiostacio CO0KEA. Foto: Osmany Mambuca, CM2OY.

ESPERANTO KAJ RADIOAMATOROJ

Radioamatoraj Kluboĵ de la Universitato de Komputikaj Sciencoj (UCI) kaj Kuba Esperanto-Asocio (KEA) kunigas strebojn kaj intensigas sian radian aktivadon

Malnova proverbo tekstas: “Unueco estas forto” kaj pri ĝi kredas gvidantoj kaj anoj de la Radiokluboĵ de la Universitato de Komputikaj Sciencoj (UCI) kaj Kuba Esperanto-Asocio (KEA).

Kun la celo plimultigi la kuban partoprenon en la HF-bendoj, tiuj ĉi du Radiokluboĵ kunformis antaŭ kelkaj tagoj la Specialan Kolektivon Radiostacion CO0KEA, kies atingojn oni jam vidas, ekz. per la partopreno en la CQ WW RTTY 2013, antaŭ nelonge okazinta.

Laŭ raporto de kolegoj Rolando Louis Madrigal Cruz (CO2LCR) kaj Javier Ramos Nistal (CL2MM), el la Radiokluboĵ de UCI kaj KEA respektive, la stacio dekomence konsistigita el CO2LCR, CO2RVA, CL2YGO, CL2MM y CL2PL, fine partoprenigis en la konkurson al CO2RVA, CM2OY, CL2MM y CL2PL, kiuj kontaktis entute 102 staciojn de 11:35 ĝis 17:25 loka somera tempo en la 29a de septembro.

La Radiokluboĵ de UCI estas unu el la du en la ĉefurbo ĉe Supera Lernejo kaj malgraŭ la fakto ke ĝi ekzistas de apenaŭ antaŭ unu jaro ĝi jam eksentiĝas en la radiomatoroj de Havano kaj ni certas, ke en la estonteco ili sukcesos transdoni novigojn pri la utiligo de komputado en la radio.

La Radiokluboĵ de Kuba Esperanto-Asocio fondiĝis la pasintan 20an de aŭgusto dum eta solenaĵo kun partopreno de Pedro Rodríguez Pérez, (CO2RP), prezidanto de la Kuba Federacio de Radioamatoroj (FRC), Alberto Fernández-Calienes Barrios, prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio (KEA), estraranoj de ambaŭ organizaĵoj, samkiel Rolando Louis Madrigal (CO2LCR), reprezentanto de UCI, Santiago Álvarez (CL2SAM), en reprezento de Municipio 10 de Octubre, kie tiu lokiĝas kaj reprezentantoj de radiokluboĵ en Centra Havano, Cotorro kaj Plaza de la Revolución.

Tiu ĉi Radiokluboĵ, fondita kun kulturaj kaj lingvaj celoj proponas prelegojn, atelierojn kaj kursojn pri Esperanto al ĉiuj interesitoj krom utiligi la lingvon en la amatora radio.

Ni bondeziras al kolegoj de CO0KEA kaj tenos la legantojn de FRCUBA informitajn pri ilia radioaktivado.

Carlos Alberto SANTAMARÍA GONZÁLEZ (CO2JC)
(laŭ raporto el la retejo de FRC: <http://www.frcuba.co.cu>)



KERo: KIO ĜI ESTAS? Origino kaj estonteco

De antaŭ kelkaj monatoj Kuba Esperanto-Asocio anoncis la venontan eldonon de la Kuba Esperanto-Renkontiĝo (KERo), kvazaŭa eksperimento kiu ekis en la jaro 2012 por plenumi vakuon ne nur pri tutlanda evento, sed ankaŭ pri momento por praktike uzi Esperanton, lerni, kunsidi, turismi kaj esperantumi en kondiĉoj de realisma realigeblo.

Kion tio signifas? Nu, la fakto ke okazigi jarajn kongresojn, eĉ trijarajn, fariĝis tre multekosta ebleco ne nur por la Asocio, sed speciale por la plejmulto de esperantistoj nialande, igis nin pensi pri alternativoj.

La ideo estis kovita de la Estraro de KEA, kiu cerbumas la diversajn eblecojn movigi la homojn, krei spacojn por renkontiĝi, lerni kaj esperantumi, sed pensante pri la ekonomia situacio de la lando, tial ke lui bonnan salonon aŭ kongresejon kie ajn, veturigi homojn kaj garantii servojn estas finance kapdoloriga kaj temporaba.

Do, KERo naskiĝis meze de iaspeca ideoŝtormo kiu finfine iĝis reala en la jaro 2012 kiam ni sukcesis lui tutan kampadejon en loko nomata Rivero Sejbabo en la centra regiono de Kubo, en provinco Villa Clara. Post la sukcesa okazigo de tiu unua eldono de KERo, la homoj restis inspiritaj kaj la Estraro de KEA pensis pri la ebleco ĝin ripetigi en diversaj lokoj.

Temis pri grandparte subvenciita evento kie sufiĉe elpensita kulturkleriga programo donis okazon al pli ol centoj da kubaj esperantistoj el la tuta lando, kune ĝui la lingvon, ankaŭ lerni kaj gustumi kvazaŭ etan UK-on, kiu daŭris preskaŭ tutan semajnon; la Estraro kaj Komitato de la Asocio kunsidis kaj plenumis konkretan rolon skizi

la laborplanon de la sekva jaro.


Tiel okazis kaj en 2013 ripetigis la evento, ĉi-foje en la kampadejo Ŝtuparoj de Haruko en la nordorienta parto de Havano ĉe bela natura regiono kun partopreno de pli ol 200 kubaj esperantistoj plus kelkaj eksterlandaj vizitantoj. Grava trajto de la evento estis doni spacon al la junularo kiu transprenis ĝin kun granda entuziasmo.

Do, nuntempe oni jam planas la trian KERo 2014 okazonta de la 12-a ĝis la 16-a de marto en la okcidenta parto de Kubo, en provinco Pinar del Río, kie ni atendas ankaŭ partoprenon de eksterlandaj gastoj.

La evento ekmaturiĝas kaj surbaze de la spertoj akiritaj oni organizas programon kiel eble plej varian kun programeroj por ĉies gustoj kaj bezonoj, lernado, ekzamenoj, laborkunsidoj, kulturaj aranĝoj kaj turismo estos la program-enhavo kiu pere de Esperanto arigos la tutlandan esperantistaron kaj bonvenigos eksterlandajn esperantistojn.

KERo 2014 estas la plej tuŝebla garantio de estonteco por Esperanto en Kubo, kvankam ne la sola, sed apartenas al tiuj eventoj kiuj alvenis por semi kaj florumo nian movadon en renoviga ondo kiu trairas la internacian esperantistan komunumon.

Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ



Mark Fettes NOVA PREZIDANTO DE UEA



La novelektita Estraro de UEA. De maldekstre: Lee Jung-kee, Barbara Pietrzak, Martin Schäffer, Mark Fettes, Stefan MacGill, Stefano Keller kaj José Antonio Vergara. Foto: esperantoilustrita.blogspot.com

Prof. d-ro Mark FETTES el Kanado estis elektita kiel la nova prezidanto de Universala Esperanto-Asocio en la unua kunsido de la Komitato en Rejkjaviko sabaton, la 20-an de julio. FETTES transprenas la prezidan stafeton de Probal DASGUPTA, kiu gvidis la Asocio dum du oficperiodoj ekde 2007.

La Estraro estas preskaŭ tute nova: nur Stefano KELLER kaj Barbara PIETRZAK membris ankaŭ dum la antaŭa oficperiodo. Du

novelektitoj havas tamen antaŭan sperton pri la laboro en la Estraro: Mark FETTES estis ĝia membro 1992-1998 kaj José Antonio VERGARA 2007-2010.

La nova Estraro ekoficos lundon, la 22-an de julio, post la akcepto de la Estrara Raporto pri la jaro 2012. Tuj post sia elekto ĝi tamen jam havis mallongan kunsidon por fari proponon al la Komitato pri la prezidanto, la vicprezidanto kaj la ĝenerala sekretario: res-

pekte Mark Fettes, Stefan MacGill kaj Martin Schäffer.

Respondecoj de la estraranoj

La nova Estraro de UEA decidis pri la laborkampoj de siaj membroj: **Mark FETTES** (Kanado, prezidanto) gvidas la subteamon “Mastruma Evoluo”: Strategia laborplano, financo, Centra Oficejo, kongresa politiko, TEJO, CED, uea.org; **Martin SCHÄFFER** (Germanio/Meksiko, ĝenerala sekretario): Komitato, komunika politiko, Delegita Reto, financo kaj administrado (kunlabore kun Fettes); **Stefan MACGILL** (Nov-Zelando/Hungario, vicprezidanto) gvidas la subteamon “Movada Evoluo”: Kapabla agado (ILEI, edukado.net, aktivula trejnado), Komisionoj pri Oceanio kaj Afriko; **José Antonio VERGARA** (Ĉilio) subteamo “Konsciigo”: Tutmonda Inform-Reto (TIR); Faka agado, Terminologia Esperanto-Centro (TEC), IKU; TEJO kaj CED (kunlabore kun Fettes); **Stefano KELLER** (Svislando) gvidas la subteamon “Monda Evoluo”: Konsciigo: Komisiono pri Rilatoj kun Internaciaj Organizaĵoj (KRIO), Ĝemelaj urboj; **Barbara PIETRZAK** (Pollando) Kultura evoluigo (i.a. Akademioj Lingva kaj Literatura, Belartaj Konkursoj), Komisionoj pri Eŭropo kaj Mezoriento/Nord-Afriko; **LEE Jung-kee** (Koreio) Kapabligo (kunlabore kun MacGill), Novaj landaj asocioj, Komisiono pri Azia Esperanto-movado, E-Centroj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, 506, 510.

Christer Kiselman NOVA PREZIDANTO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

Profesoro Christer KISELMAN el la Matematika Instituto de la Upsala Universitato (Svedio) estas elektita kiel la nova prezidanto de AdE rezulte de la voĉdonado de 37 akademiianoj.

Christer KISELMAN ekde 1989 estas membro de AdE; lastatempe li oficis kiel direktoro de la sekcio pri faka lingvo kaj membro en la sekcioj pri gramatiko, pri la ĝenerala vortaro kaj pri prononco. La nova estraro estas kvarpersona: Christer KISELMAN, prezidanto; Probal DASGUPTA, vicprezidanto; Brian MOON, vicprezidanto; Renato CORSETTI, sekretario. Kiel direktoroj estis elektitaj: Sergio POKROVSKIJ, Faka Lingvo; Bertilo WENNERGREN, Gramatiko; Markos KRAMER, Ĝenerala Vortaro; Anna LÖWENSTEIN, Kontrolado de lerniloj; Alexander SHLAFER, Lingva Konsultejo; Paul GUBBINS, Literaturo; Probal DASGUPTA, Prononco; Carlo MINNAJA, Komisiono Historio de AdE; Nguyen XUAN THU, Komisiono pri homaj nomoj.

Fabício Valle NOVA REDAKTORO DE LA REVUO *Esperanto*

Unuafoje en pli ol cent jaroj, la revuo *Esperanto* havos sian redaktejon ekster Eŭropo. La brazilano Fabício VALLE estas elektita de la Estraro de Universala Esperanto-Asocio (UEA) por transpreni la redaktoran postenon de Stano Marček, ekde la jarkolekto 2014.

“Jam en sia skriba sinprezento, Fabício VALLE montris grandan energion kaj kremon, kaj krome tre realisman ideon pri la redaktora laboro”, komentas la Prezidanto de UEA, d-ro Mark Fettes. “Tiun impreson plene konfirmis mia telefona intervjuo kun li. Ni estas entuziasmaj pri la ideoj kaj kapabloj, kiujn li alportos al nia komuna afero.”

VALLE estis unu el ses kandidatoj por la posteno de redaktoro (unu pli ol anoncite en pli frua komunikado). Movadano ekde 1970, li okupis diversajn postenojn en la brazila movado, interalie kiel prezidanto aŭ estrarano de Brazila Esperantista Junulara Organizo (1977-81), oficisto de Brazila Esperanto-Li-

go (1996-2001) kaj prezidanto de la Federacia Konsilantaro de BEL (2001-04). Li ankaŭ fondis kaj gvidis propran eldon-entreprenon, Zamenhof Editores, de 1987 ĝis 1995. Lastatempe li okupiĝis pri provoj kreskigi la esperantistan ekonomion kadre de la organizo Intraespo.

La redaktoraĵoj de VALLE estas videblaj en la ok numeroj de *Brazila Esperantisto*, kiujn li redaktis en la jaroj 2001-02. Enkondukante novan aspekton kaj novan teamon de kunlaborantoj, li kreis revuon kiu elstaris grafike, stile kaj enhave. Ankaŭ por la revuo *Esperanto* VALLE antaŭvidas proksiman kunlaboron kun talentuloj sur diversaj kampoj, cele al revuo kiu “transformiĝos en aktivan engaĝilon, en instrugazeton por trejnado de volontuloj, en heroldon de la plej bonaj iniciatoj de la movadaj organizoj tra la mondo, en gvidilon por veteranaj kaj komentantaj E-gvidantoj, en inspiron por la esperantoj.”



ELEKTOJ 2014 GRAVA MOMENTO EN LA ASOCIA VIVO

Alberto FERNÁNDEZ-CALIENES BARRIOS

Finiĝas la mandato 2011-2014 kaj ĉiuj instancoj de la Asocio preta por elekti novajn estrarojn. La Elektokomisiono de la Komitato, respondeca pri la elektoj de la Nacia Estraro, elektiĝis dum la Komitatkunsido okazinta pasintjare en Escaleras de Jaruco kaj multe laboris por garantii bonordan kaj laŭstatutan elekton.

La komisionon membras Graciela Morgado Rodríguez (prezidanto), José Luis Montes de Oca Cárdenas kaj Norberto Díaz Guevara. Laŭ cirkulero sendita al komitatanoj, ili kolektas proponojn kaj sinproponojn (akompanatajn de aldonaj dokumentoj kaj foto) por kandidatiĝoj kun limdato en la 31-a de oktobro.

Komence de novembro la Elektokomisiono kunsidos en Contra-maestre kaj januare de 2014 ĝi liveros al la Komitato raporton pri la farita laboro.

Tre gravas nun prepari la Ĝeneralajn Asembleojn en niaj filioj kaj grupoj por revui la faritan laboron, kunpensi la estontan agadon kaj en la bazo per la opinioj kaj kunlaboro de ĉiuj skizi la laborplanon de la nova jaro kaj periodo.

KEA sukcesis senĉese kreski ekde la fondiĝo ĝuste pro la teama laboro. Tio montriĝis ĉiam la plej granda atuto de nia movado ekde 1979: fondi, varti kaj flegi institucion kiu reprezentas la volon de ĉiuj kubaj esperantistoj kaj kiu kolektive garantias la sukceson de Esperanto en nia lando.

Ni kune festis sukcesojn kaj datrevenojn. Ni daŭre laboru por ili. Ni ĝojas ĉiam, kiam ni renkontas novan vizaĝon en niaj aranĝoj kaj eĉ pli kiam tiuj novuloj eĉ se balbute jam ekiras la vojon.

Venas taŭga momento por kune pripensi nian estontecon. Vi nepre partoprenu

La tradicia aranĝo kiu okaze de la Zamenhofa tago kunvenigas ĉiujare kubajn kaj alilandajn esperantistojn atendas vian aktivan partoprenon.

ZAMENHOFA METIEJO 2013
12-15 decembro 2013
Kampadejo Jakabo

Aliĝoj kaj pagoj:
S-ro Leonardo Luna Neyra
Calle 1 Norte 801
entre San Gregorio y Cuartel
Guantánamo
95100 Guantánamo

Kuba Esperanto-Asocio
Apartado 5120, 10500 La Habana, Cuba
+53 7 640 4484
info@esperanto.cu.cu
www.esperanto.cu/cu



Kuba Esperanto-Renkontiĝo
Kampadejo Dos Hermanas
Viñales, Pinar del Río
12-16 marto 2014



RADIO HAVANO KUBO
Kurtondaj kaj retaj elsendoj
www.radiohc.cu/eo



esperanto.cu estas trimonata bulteno sendita al komitatanoj, estraranoj kaj aktivuloj de KEA. Reta versio elŝuteblas de nia retejo www.esperanto.cu/cu. **Redaktis:** Alberto F. Calienes, Maritza Gutiérrez kaj Javier Ramos. **Enpaĝigis:** Alberto F. Calienes

